tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

Aprilo 2021 / n-ro **137**



- **Granda tertremo de 6,2 gradoj laŭ Richter-skalo trafis Kroation**
- **Kroata Esperanto-Ligo havas youtube-kanalon**
  https://www.youtube.com/channel/UCCyyqtw-QeFNtHr-Nld10dw
- **Ekspozicio pri Zamenhof en la zagreba biblioteko Vjekoslav Majer**
- **Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj fariĝis 50-jara**

Karaj legantoj

En nia lasta numero Tempo 136 el oktobro 2020, ni ne povis konjekti kiel malfacilaj tempoj nin atendos en la semajnoj venontaj: tiam ni finis la numeron per la informo ke en la domo, kie estas nia klubejo en Vodnikova 9, ni en oktobro riparigas la fumtubojn post la terura tertremo kiu trafis nin la 22an de marto 2020. La tertremo havis fortecon de 5,5 laŭ la skalo Richter. La lasta tiel forta tertremo okazis antaŭ 140 jaroj! Do, ni naive imagis ke post tiu marta tertremo ni ĝuos trankvilon dum iom da jardekoj.

Pli ol 20000 zagrebanoj havis detruitajn fumtubojn, la tuta laboro progresis tre malrapide, ĉar mankis konstruistoj.

Dum la tuta mondo suferas pro la kronviruso kaj reduktis siajn vivojn al minumumo, ni havis aldonan tertreman plagon.

Oktobro plenis je adiaŭaj programoj honore al niaj du forpasintoj **Davor Klobučar** kaj **Zlatko Tišljar,** sen kiuj vere neripareble ŝrumpis la kroata Esperantujo.

Tamen ni havis sukcesan virtualan Zamenhof-tagon per la programo Zoom, kiun gvidis **Ankica Jagnjić**. En la programo ni prezentis kion ni faris dum la malfacila jaro 2020. Ĉirkaŭ 20 spektantoj rigardis la programon.

Nia nova membro **Branka Sacher**, por helpi prezenti niajn programojn organizis la youtuban kanalon de Kroata Esperanto-Ligo. La youtube-kanalo spekteblas ĉe https://www.youtube.com/channel/UCCyyqtw-QeFNtHr-Nld10dw

Tiam venis la plej terura frapo: la 29an de decembro trafis **Kroation** nova fortega tertremo, pli forta ol la marta. Ĝi havis fortecon de 6,2 gradoj laŭ la skalo Richter. La epicentro estis en la regiono **Banija,** en la urbo **Petrinja**, kies malnova urbocentro neniiĝis. Je 70 km for de Zagrebo krom Petrinja kunsuferis du apudaj urboj **Glina** kaj **Sisak**. Ankaŭ **Zagrebo** estis tre forte trafita. La riparitaj kamentuboj denove forflugis. Multaj kulturaj konstruaĵoj, muzeoj kaj teatroj, plenaj je nia historio estis damaĝitaj. La domo en la strato Vodnikova 9, kie estas nia sidejo, ricevis fendon en unu el siaj eksteraj muroj. Kvankam la fendo estas eta, la humido facile trovas vojon al ni.

Por doni al vi ideon pri la tertremo, ni publikigas artikolon de nia membro **Vladimir Dujnić** kiun la tertremo trafis en la urbo **Hrvatska Kostajnica**. Ni ankaŭ publikigas informon kiel niaj membroj klopodis mildigi la posttertremajnsuferojn en la regiono **Banija**.


Ni ĉiuj daŭrigas niajn perturbitajn vivojn.

Ni surbendigis en 2020 du eldonojn de Tempo sur kompaktdiskoj en studio de la zagreba blindula legejo, por niaj legantoj kiuj havas vivhandikapon.

Ĉu poezio helpos al ni travivi? Tiu numero de Tempo plenas je poezio. **Božidar Brezinščak Bagola,** honore al hospitalaj flegistinoj dum la pandemia tempo prezentas poemon *Flegistinon Maria*. **Nikola Rašić** sendis al ni sian tradukon de *Soneto por Biba*, de nia samideano **René Matoušek**, mortpafita en la milito en 1991. **Davor Klobučar** postlasis al ni tradukon de *Nia ulĉjo* de **Silvije Strahimir Kranjčević** kaj provizis multajn utilajn piednotojn. **Snježana Ivanović** verkis *Poemon sen nomo*.

Membroj de Esperanto-Societo Tibor Sekelj renkontiĝis kun antikvaĵisto **Antun Nikolić** la 10an de marto kaj aĉetis de li plurajn dokumentojn kaj fotojn de la pioniro de kroata Esperanto-Movado **Mavro Špicer.**

Spomenka Štimec publikigis libron en la kroata *Hodler u Mostaru,* fikcion inspiritan per la vivo de **Ferdinand Hodler**. Post kiam la aŭstra verkisto Clemens J. Setz publikigis en la germana lingvo sian libron pri la plalingvoj titolita „Abeloj kaj la nevideblo“, en kiu li unu ĉapitron dediĉis al la literatura verkado en Esperanto de **Spomenka Štimec**, ŝi donis 3 intervjuojn al regionaj gazetoj *Zagorski list, Varaždinske vijesti* kaj *VTV Varaždin*.



La 50an jubileon de sia asocio festas en 2021 Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj – KUNE, kiu estis fondita la 19an de januaro 1971. Ĝi planas por la jubileo okazigi internacian renkontiĝon en **Premantura** en **Istrio. Antun Kovač** donis intervjuon pri la jubileo por la aprila *Zagreb News.*

Božidar Brezinščak Bagola verkis por Esperanto-revuo recenzon pri la nova libro pri **Hector Hodler** eldonita en Esperanto kaj la franca en **Svislando**.

Kroata Fervojista Esperanta Asocio aranĝis la 27an de marto subĉielan omaĝprelegon pri la iam tre ŝatata turisma etŝpura fervoja linio **Samoborček,** kiu trafikis inter la urboj **Samobor** kaj **Zagreb** de 1901 ĝis 1979. Prelegis d-ro **Zlatko Hinšt**. Temon *Mapado de Trešnjevka* prezentis **Vanja Radovanović**. La aŭskultintoj vizitis kelkajn lokojn je la iama traceo de **Samoborček.**

Biblioteko **V. Majer** en **Zagrebo** gastigis ekde la 1a de aprilo 2021 la ekspozicion pri **Zamenhof** kaj lia familio kiun lige al la temo holokausto preparis en 2020 bibliotekstino **Karmen Delač-Petković**.

Josip Pleadin kontribuis la artikolon pri la pioniro de la kroata Esperanto-Movado **Rudolf Rubčić**.

La kultura aranĝo *Renkontiĝo de meteorito* en vilaĝo **Hrašćin**a atingis sian kvaronjarcentan jubileon festotan per kultura programo la 29an de majo 2021, se la epidemio permesos.

Fartu bone!

Spomenka Štimec

tempo

Fondita en 1980. Ne aperis en la militaj jaroj 1993 kaj 1994. Ĝis la jaro 2017 aperis papere kaj voĉe sur kompaktdiskoj. Jaro XLI (41), numero 137 (1/2021). ISSN0352-1583. Sona numero 55/2021.

Tempo aperas sone sur kompaktdisko ĉe Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj en Zagrebo ekde 2004. Voĉlegas Spomenka Štimec. La reta versio de Tempo ĉe **www.esperanto.hr/tempo_kel.htm**

Redakcio/Uredništvo; **Eldonisto/Izdavač** Hrvatski savez za esperanto / Kroata Esperanto-Ligo, Vodnikova 9, HR10000 Zagreb, Kroatio, +385 (91) 4617550; esperanto@zg.t-com.hr, www.esperanto.hr; IBAN HR6124840081100881157; OIB 53992829935

Kontribuis: Božidar Brezinščak Bagola, Siniša Dvornik, Vladimir Dujnić, Irena Đuričić, Zlatko Hinšt, Snježana Ivanović, Antoaneta Klobučar, Davor Klobučar, Antun Kovač, Silvije Strahimir Kranjčević, René Matoušek, Vesna Radošević, Nikola Rašić, Josip Pleadin, Branka Sacher, Clemens Setz, Spomenka Štimec, Ivan Špoljarec, Vratari Istre.

Redaktoris: Spomenka Štimec. **Grafika aranĝo:** Ivan Špoljarec.

La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la subskribitaj artikoloj.

Foto sur la titolpaĝo: Zagreb - post la tertremo 2020. (Fotis Ivan Špoljarec)

HELPO POS LA TERTREMO EN BANIJA

La estraro de Kroata Esperanto-Ligo kunsidis la 9an de januaro 2021 por decidi kiel helpi al niaj membroj trafitaj de la tertremo la 29an de decembro 2020.

Estis decidite ke KEL helpu per sume 1.000 kn por subteni Esperanto-Societon Petrinja kaj Esperanto-Societon Sisak por vivtenigi ilin per pago al la konto de Esperanto-Societo Sisak, ĉar tiu de Petrinja ne plu funkcias.

Ni informiĝis ke unuopaj membroj jam sendis privatan helpon al la regiono laŭ sia bontrovo: Esperanto-Societo **Rijeka** financis per 5.000 kn Asocion de Blinduloj en Sisak. **Dalibor Šeatović** zorgas pri unu familio en **Petrinja**. **Božidar Brezinščak Bagola** sendis privatan monhelpon al Biblioteko en **Petrinja. Spomenka Štimec, Zdravka Metz** kaj **Teodora Kučinac** sendis privatan monhelpon al individua membro **Vladimir Dujnić** en **Hrvatska Kostajnica.**

Vladimir verkis esperantlingvan artikolon pri la tertremo por *Esperanto-Revuo* en **Roterdamo** kiun ni publikigas ĉi-numere. Li loĝas en la domo kun flava etikedo. La domo estas parte loĝebla, en la teretaĝo. Li bezonos renovigi la supran duonon de la domo, kiam eblos. Je la demando kiel li varmigas la domon, li respondis ke li ne hejtas.

Estis kontaktita la familio de **Mladenka Đaković**, kies edzo, esperantisto kuracisto **Predrag Đaković,** pereinta en la milito, havis gepatran domon en **Petrinja**. La domo, tute detruita en la milito kaj rekonstruita, nun travivis la tertremon sen damaĝoj.

La estraro decidis ke oni telefone kontaktu membrojn, la iamajn kursanojn, laŭ la membrolisto el 2011 kaj 2013 (kiam la societoj el **Zagreb** kaj **Sisak** laste prezentis siajn membrolistojn). Rezultoj de la januaraj kontaktoj:

- **Spomenka Štimec** telefone parolis kun instruistino **Irena Sigur** el **Petrinja:** Ŝia domo estas damaĝita, necesas rekonstruo, ŝi ricevas helpon de la partnera lernejo el **Dubrovnik/Lapad**. Ŝi sukcesis iel riparigi la fumtubojn kaj hejtas per lignaĵo, kiu restis bonorde en la korto. Ŝi loĝas en la domo kun la flava etikedo. Ŝi laboris en Prva osnovna škola **Petrinja**, la iama *Artur Turkulin*, kie pedagogino estas nia iama membro **Vesna Gračanin**. Laŭ ŝia informo la lernejo devos esti detruita. La pedagogino **Vesn**a fartas bone sed devis elloĝiĝi el sia loĝejo.
- **Spomenka Štimec** kontaktis rete **Srećko Radulović**, vicprezidanton de Esperanto-Societo **Petrinja**. Lia domo en Lonjska 74 en **Sisak** havas problemojn pri statiko. Damaĝoj estas en subtegmentejo. Li kiel vicprezidanto de Esperanto-Societo **Sisak** entreprenis monkolektadon por helpi al la membroj de la societoj en **Sisak** kaj **Petrinja** kaj kolektis per la konto de Esperanto-Societo **Sisak** helpon de pli ol 6000 kn.
- Spomenka interŝanĝis retmesaĝojn kun **Nataša Dorosulić**, prezidantino de Esperanto-Societo **Sisak,** kiu informis ke ŝia domo ne aparte suferis, krome ke detruiĝis la bretoj. Nataša ankaŭ informis ke membroj **Kristijan Babić** kaj **Ivan Ređep** fartas bone.
- **Judita Rey Hudeček** parolis telefone kun la iama membro **Goga Šešerin,** kiu nun laboras pri distribuo de la helpo en **Sisak.**
- Spomenka parolis kun **Markica Vujnović,** pensiulino. Ŝia domo de ekstere aspektas bone, interne estas detruitaj fumtuboj. Momente ŝi bezonas nenion.
-Spomenka parolis kun **Slavko** Šantek**.** Lia loĝejo ne estas multe damaĝita ĉar bone konstruita. Li demandis ĉu li iel povas helpi al ni?
- Spomenka parolis kun pensiulino **Ivana Ramušćak** Ŝi fartas bone en la loĝejo kun verda etikedo. Ŝi havas pension, sed en **Petrinja** post la tertremo nenio estas aĉetebla, por ĉiu bezonitaĵo necesas iri al **Sisak**. La panon distribuas Ruĝa Kruco.
- Spomenka parolis kun **Zdenka Gašparić,** instruistino, momente troviĝanta en patrina forpermeso. Ŝi havas bebon de 7 monatoj kaj filineton de 4 jaroj. La edzo estas aktiva armeano en **Petrinja.** Ŝi kun infanoj nun estas en **Voloder** ĉe parencoj, atendante ke trankviliĝu la tertremoj. Ŝi kaj la edzo aĉetis novan domon kaj planis enloĝiĝi en printempo, sed nun tiu domo bezonos novan tegmenton kaj amason da konstrulaboro por igi ĝin loĝebla.
- **Spomenka** parolis kun la onklino de **Hrabren Kudumija**, la iama Esperanto-kursano el **Bjelovar**, aĉetinta domon en **Petrinja** kaj profesia armeano en **Petrinja**: la domo bone eltenis. Necesos riparoj en printempo.
- **Spomenka** parolis kun **Ivica Butorac** en **Sisak,** kies domo havas murojn sed ne havas tegmenton. Liaj ĉevaloj estas ekster la ĉevalejo ĉar ĝi ne estas sekura. Aliaj bestoj restis en siaj staloj. Kian helpon li bezonas? Kiam trankviliĝos la tertremoj bonvenos masonistoj! Tutan teamon!
- **Spomenka** parolis kun **Bernard** Ćulibrk, malsana kaj loĝanta en Maljunula hejmo Dom Sv. Kvirina, **Sisak**. Li iam laboris en Hotelo en **Sisak**.”Mi havas bonan pension, mi havas filon Sebastian 30-jaraĝan en **Zagrebo**, laboranta en “Končar”. Kion mi bezonas? Nenion. Mi ŝatus legi iun Esperanto-gazeton**!”** **Spomenka** sendis al li pakaĵon kun gazetoj.

Ne sukcesis kontaktoj en **Petrinja** kun **Bernarda Vajdić, Darko Hobor, Marica Lovreković.** En **Sisak** ne sukcesis kontaktoj kun la iama membro **Ljiljana Bonev.**

Dum la esplorado estis konstatite ke en la lastaj jaroj mortis la iamaj membroj de la **Societo en Petrinja Josip Štajcar** kaj **Jadranka Kljajić. (**Informis **Nataša Dorosulić)**

Ĉiuj kun kiuj mi parolis estis kortuŝitaj pro altelefonado.

S. Štimec

Kvankam mia urbeto **Hrvatska Kostajnica** ne troviĝas en la vera centro de antaŭnelongaj decembraj tertremoj trafintaj **Kroation**, kiel la plej difektitaj urboj **Petrinja, Glina, Sisak** kaj la ĉirkaŭantaj vilaĝoj, ni povis senti kaj sperti tutforte la detrupovon de la naturo okaze de tiu malagrabla fenomeno. La plej forta kaj detruiga tertremo (de 6,4 gradoj laŭ la skalo Richter) okazis la 29an de decembro 2020, sed multaj sufiĉe fortaj tertremoj okazis poste kaj okazas ĝis ĉi tiu momento kiam mi skribas la artikolon. La tertremo(j) detruis multajn konstruaĵojn, domojn, ŝoseojn, pontojn, preĝejojn, sep homoj perdis la vivon dum la tertremo kaj unu volontulo post la tertremo, helpante ripari tegmenton sur unu domo. Mia domo estas ankaŭ difektita, unue la fajrobrigadistoj forigis la difektitan parton de la kamentubo kaj iom riparis la tegmenton kaj poste venis statikistoj por taksi la damaĝon kaj la domo ricevis la flavan etikedon. Tio signifas ke ĝi estas difektita sed mi povas loĝi en malsupra parto de la domo ĝis la renovigo de la tuta domo.

La konstanta sento de malpovo kaj timo ĉirkaŭbrakas nin kaj sekvas nin kiel ombro en niaj ĉiutagaj aktivecoj, ĉar la vivo devas iri plu, kvankam vere ĉiumomente nova tertremo povas rompi malfortecajn homajn planetojn pri la futuro. Spite al tio, ni daŭrigas vivi. La ŝtathelpo ĝis nun pli malpli bone funkcias, sed okazis vera inundo de boneco fare de „ordinaraj“ homoj, kiuj pretas helpi kaj helpas ĉiutage, ĉiel ajn, por almenaŭ iomete malŝarĝigi la ŝultrojn de per malfeliĉo trafitaj sed kuraĝaj loĝantoj de mia regiono Banija.

Vladimir Dujnić

- Ni publikigas retadreson de Vladimir, se iu emas kontakti lin por helpi lian vivon post la tertremo: **vdujnic@gmail.com**.

Ekspozicio pri Zamenhof

Ekspozicio pri Zamenhof post Rijeka gastas en Zagrebo

Bibliotekistino **Karmen Delač-Petković** el Maŝin-ŝipkonstrua lernejo en **Rijeka** jam pli ol 35 jarojn organizas ekspoziciojn por siaj lernantoj en la faka lernejo. En la jaro 2020, farante ekspozicion pri holokaŭsto, ŝi ligis la temon al **Lazaro Ludoviko Zamenhof** kaj lia vivsorto: lia tuta familio pereis en holokaŭsto. La familion **Zamenhof** ŝi prezentas sur pluraj ekspoziciaj tabuloj.

Esperanto-Societo el **Rijeka** helpis ke la ekspozicio venu al **Zagrebo**: la prezidanto **Boris Di Costanzo** persone transportis la ekspoziciajn tabulojn de **Rijeka** al **Zagrebo** kaj ili ekde la 1a de aprilo 2021 estas prezentitaj en Biblioteko **Vjekoslav Majer** en la zagreba urboparto **Zapruđe**, sub la prizorgo de bibliotekstino **Vesna Radošević**, mem esperantistino. La ekspozicio restos en la biblioteko dum la monato aprilo 2021. La biblioteko per la ekspozicio kontribuas al la memoro pri la trarompo de kaptitoj el la koncentrejo **Jasenovac** la 22an de aprilo 1945, kiam 600 el 1073 malliberigitoj klopodis fuĝi. Nur 117 el ili sukcesis saviĝi.



Fotis Vesna Radošević

Kroata Esperanto-Ligo kontentas povi publike memori pri **Zamenhof** kaj lia familio en la monato kiam estas la datreveno de la morto de Zamenhof, la 14an de aprilo 1917.

Bedaŭrinde, pro la kronvirusa epidemiologio ne estis permesate prizorgi pli nombran publikon sed pri la ekspozicio oni raportis rete.

S. Štimec

Novaĵoj el **Dokumenta Esperanto-Centro**

− Komence de aprilo DEC ekipiĝis per novaj arkivaj ŝrankoj, aĉetitaj post monkolekta kampanjo lanĉita en oktobro 2020. Du el tiuj ŝrankoj portos la nomojn „Branko Repac" kaj „Esperantic Studies Foundation", honore al la donacintoj de sumoj por ilia aĉeto.

− La Erasmus+ projekto, kiun sub la titolo „Reta edukado nun" gvidas Bjalistoka Esperanto-societo, kaj en kiu Dokumenta Esperanto-Centro estas unu el la kvar partneroj, okazigis du siajn retajn kunvenojn. La tria reta kunveno, dum kiu oni devus decidi ĉu la unua reala kunveno okazu en Đurđevac en julio kiel planite, okazos la 21-an de aprilo.

− La gvidanto de DEC, **Josip Pleadin,** donis du intervjuojn: la unuan al la ĵurnalistino **Nikol Bali** el „Glas Podravine i Prigorja", kiu vizitis la Centron la 20-an de januaro kaj publikigis pozitivan artikolon pri Esperanto en la retejo *glaspodravine.hr* , kaj la alian al Đurđica **Mustaf** el **Koprivnički Bregi** por *Pressedan.hr* , la studenta portalo de la Universitato Nordo (Sveučilište Sjever) el Koprivnica.

− La 22-an de februaro 2021 en la retejo de Esperantic Studies Foundation el Usono (*esfconnected.org*) aperis la dulingva (Esperanto-angla) teksto „La nacia Esperanto-arkivo en Kroatio", kiu en ĉefaj trajtoj prezentas Dokumentan Esperanto-Centron. Samtempe Esperantic Studies Foundation atribuis 500-eŭran subvencion al DEC por la kampanjo pri aĉetado de arkivaj ŝrankoj.

− Dank' al Ivan Špoljarec, la 20-an de februaro 2021 realiĝis transporto de la tuta stoko de Esperantaj libroj, kiujn al Dokumenta Eperanto-Centro donacis Kulturcentro Travno (la eksa Internacia Kultura Servo), kiu devis liberigi sian deponejon. El Zagrebo al **Vrbovec** la librojn transportis Ivan Špoljarec, kaj el Vrbovec al Đurđevac Josip Pleadin.

− Jarfine de 2020 Dokumenta Esperanto-Centro publikigis bildlibron pri šako, kies tekston verkis **Darija Budiša** kaj ilustris **Luca Cetinić**, ambaŭ membroj de Esperanto-societo „Split", kiu financis la eldonon.

− Meze de aprilo, la Urbo Đurđevac atribuis al **Josip Pleadin** Diplomon (*Povelja Grada Đurđevca*) por multjara promociado de la Urbo, aparte pro lia Esperanto-agado.

− Baldaŭ ekfunkcios la dulingva retejo *www.dec-kroatio.hr*, kiun DEC pretigas kunlabore kun la firmao Logos-IT d.o.o. el Đurđevac**.**

J. Pleadin

120 jaroj de Samoborček

OMAĜO AL 120 JAROJ DE LA ETŜPURA FERVOJA LINIO ZAGREB-SAMOBOR

Membroj de Esperanto-Societo „Tibor Sekelj" kaj Kroata Fervojista Esperanto-Asocio (KFEA) partoprenis sabate la 27-an de Marto 2021 programon en **Zagreb** okaze de 120 jaroj de la fervoja lino **Zagreb-Samobor** (longa 19 kilometrojn), kaj la trajno nomita Samoborček. Ni renkontiĝis je la 11,00 horo en granda vojkruciĝo de strato de Jukić kun stratoj de Jagić, Izidor Kršnjavi kaj Božidar Adžija, suda fina parto de kvartalo Donji grad, vidal-vide de tramhaltejo de tramo 2. Ni ekiris trans unu al alia flanko de Jukićeva ulica, kaj tiam komenciĝis prelego de **Zlatko Hinšt**. Enirinte sub ponto en fervoja taluso en Ulica Božidara Adžije en la urba kvartalo **Trešnjevka-nordo** kaj ni trarigardis la finstacion de nun nostalgiaj trajnoj de etŝpura (760 milimetrojn larĝa) fervoja linio **Zagreb-Samobor**. La trajno trafikis ekde la 1901 ĝis la jaro 1979 (ekde 1951 estis konstruita fervoja linio de **Samobor** al **Bregana**, longa 5 km). Estis prezentitaj detaloj pri fondiĝo de akcia kompanio de Vicinala fervojo **Zagreb-Samobor** kaj ŝanĝoj de posedantoj de la ŝtataj fervojoj, al la urbo **Zagreb** kaj la Zagreba Elektra Tramo (ZET). Kiam malpliiĝiis la transportoj de pasaĝeroj kaj varoj pro konkurenco de ŝosea trafiko (autobusoj, personaj aŭtomobiloj kaj kamionoj) bankrotis la etŝpura fervojo.

Vanja Radovanović prezentis interesan kaj multarean projekton en la formo de la portalo okupiĝanta pri multdetala mapado kaj priskribado de la urba kvartala nomita „Mapado de Trešnjevka". Oni ŝatus renovigi la eksan traceon de la linio de Samoborček por bicikla vojo. Ĝis nun la urba administracio ne akceptis.

Sekvis promenado al unua Samobora stacidomo ekde la jaro 1901 (nun Bierejo „Trešnjevka"). La 16-an de Januaro 1901 estis malfermita fervoja linio kaj ekveturis la unua trajno de **Zagreb** al **Samobor** (la lasta trajno trafikis la 31-an de Decembro 1979). Alveninte antaŭ la menciita Stacidomo **Zlatko Hinšt** daŭrigos prelegon kun detaloj pri fervojveturilaj kapacitoj (nombroj kaj karakterizoj de vaporaj kaj dizelaj lokomotivoj, dizelaj motoraj trajnoj, pasaĝeraj kaj varaj vagonoj). Estis aparte menciitaj dizel motoraj trajnoj kies porteblaj partoj estis ellaboritaj el aluminio (nomitaj Srebrna strijela – Arĝenta sago). Estis menciita tn. „teatra trajno" (kazališni vlak) kiu forveturas kiel lasta trajno el **Zagreb** je 22,45 h al **Samobor** ebligante vizitadon de teatraj kaj aliaj okazaĵoj.

Poste ni sur la teraso de Bierejo, kun trinkaĵoj enmane, daŭrigis rakontadon kaj memor(ig)ojn pri iamaj Samoborček kaj **Zagreb**. Post la amikumado en la bierejo ni daŭrigis promenadon ĝis sekvonta haltejo de trajno Samoborček gvidita de **Roža Brletić-Višnjić**.

d-ro Zlatko Hinšt

Fotis Siniša Dvornik



- - - - - - - - -

Noto: Estas interese mencii ke la tre populara etŝpura trajno Samoborček havis rolon eĉ en la originala Esperanta poezio! En la jaro 1924 zagrebaj esperantistoj ekzercadis teatraĵon La morto de delegito de UEA de **Nikolao Hohlov**. Post la ekzercoj la grupo ekskursis per Samoborček al **Samobor**. La vento ĉe la trajna fenestro inspiris **Hohlov** krei unu el la plej belaj poemoj de la origina esperanta literaturo. Legantoj ofte imagas en la poemo **Siberion**.
Laŭ esperantistino **Jelena Manojlović** la inspiro venis de la trajno Samoborček. „Post amuza kabaredo" estis post la ekzercoj de la komedieto de „Morto de la delegito de UEA".

Vintra fabelo *(fragmento)*
Sur la sledo, svelta sledo, post amuza kabaredo,
Kun tintila sonorad'
Ni veturas, aventuras, la ĉevaloj fluge kuras
Sub la stela miriad'.

En sereno de l' ebeno malaperas la fadeno
De la glata vintra voj'...
Mia Nita - am' subita, de la frost' ebriigita
Alpremiĝas en la ĝoj'.
.....
Noto de S. Štimec: Laŭ **Jelena** – Nita estis **Ljubica**.

KUNE: jubileo granda -festo modesta

Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj ĉi-jare festas la 50-an datrevenon de sia fondiĝo. Ĝi estis fondita la 19-an de januaro 1971. Sian 50-an datrevenon, plejgrandparte pro la kronviruso kovid-19 kiu kaŭzis la pandemion (sed ankaŭ pro manko de financaj rimedoj), KUNE festos tre modeste. La programon de festo akceptis elektkunveno organizita la 8-an de marto 2021.

La centra evento estos organizota, (se la virusao nomata kovid-19 permesos), de la 19-a ĝis la 22-a de aŭgusto en **Premantura.** La evento estas titolita*: Najbaroj kun ni – okaze de la 50-a datreveno de Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj*. Laŭ la projekto jam farita kaj sendita al Ministerio pri kulturo kaj medioj, tio estos renkontiĝo de nevidantaj esperantistoj el ses landoj: **Aŭstrio, Bosnio kaj Hercegovino, Ĉehio, Hungario**, **Italio** kaj **Serbio** (po du esperantistoj kun akompananto el ĉiu lando) kun KUNE-anoj.Temo de la renkontiĝo: 50-jara agado de kroataj blindaj esperantistoj kun rerigardo al la esperanta movado en pasintaj 50 jaroj.

Krom prelegoj, diskutoj kaj komentoj, oni ankaŭ planas distrajn enhavojn kaj unu ekskurson.

Pri sia 50-jara agado kaj nuna situacio KUNE planas plifortigi informadon al la kroata publiko.

Pri la signifo de Esperanto ni ankaŭ planas interparoli kun lernantoj el Centro „Vinko Bek" kaj kun nevidantaj studentoj, kun la intenco trovi novajn membrojn por nia Unuiĝo.

Antun Kovač

Silvije Strahimir Kranjčević
(1865 – 1908)

NIA ULĈJO[1]

- Ekde kiam, almozulo, la manikoj vake pendis?
- Depost kiam, mastro mia, oni min al Lisa[2] sendis.

- Fulme tondris, kvazaŭ rompe la diabloj freneziĝis;
Mi surgrimpis fregat-pinton ĉar flag' nia implikiĝis.
Tra fumego, tra kuglaro, ŝipopruo sturmis nia,
Mi eĉ nune vivon donus, por Tegetov[3], ridet' lia!

En la alto dum mi staris, la scenejo estis jena:
Ne videblis plu la maro, tra l' nubaro fumoplena.

De l' fortegaj ŝipoj estis akraj pintoj luliĝantaj
Kial ĝuste nia flago estu ne fiere flirtanta?

En momento mi rimarkis: la italoj nin alpremas,
De la pint' insidas unu, flagon nian rabe prenas.

„Vi ne faros, *galioto*[4]!" – mi protektis flagon nian.
Kaj de sube kugloj trafis korpon mian, korpon lian.

Mi videtis ke li falis, sekvis tuje falo mia,
Dum la falo li kriegis: „*Ev-ev-iv-va I-ta-li-a*[5]".

Pensis mi: „Ĉe ni itale ne kriaĉu, besta koto!
Amiraljo[6] nia vivu", mi ekkriis, „ho, ĉozoto[7]!".

Kio pluis, mi ne scias; longe, longe estis tiel:
Ambaŭ manojn jen mi perdis kaj laŭeble vivas iel.

Pensieto eta estas, bonuloj aldonas eron.
Meson por la *amiraljo* ĉiun pagas mi someron.

Kaj mi preĝas por ke Dio niajn pekojn nun deprenu,
En la vivo plian jaron Li bonvole min plu tenu.

Irus mi al Dipatrino, al Krasno[8] mi foje venos,
Ke mi tie humiliĝu, antaŭ ol min tombo prenos.

Min doloras, ke mi diris, mastro, al la hom' baptita
Hundan vorton – Di' pardonu! - kiam estis li trafita.

Sed mi diris! Ambaŭmane *amiraljon* mi defendis,
Kaj kriplulo senvalora ne ĉiam mi tia estis!

Esperantigis Davor Klobučar



Fotis Ivan Špoljarec - Štef

- - - - - - -

Klarigoj pri iuj vortoj en la traduko:

1. Ulĉjo = Viro ordinara, simpla kaj ŝatata. Origina titolo en la kroata "NAŠ ČOVO"

2. Lisa = Kroata insulo Vis en iuj kroataj dialektoj.

3. Tegetov = Wilhelm von Tegetthoff, aŭstria admiralo. Ĉe la insulo Vis (ĉi tie Lisa) venkis kontraŭ la itala floto atakanta la insulon en 1866. Sub lia komando batalis multaj kroatoj, samkiel la heroo de ĉi poemo. La nomo de la admiralo estas ĉi tie skribita fonetike kaj mise, ĉar uzata de neklera homo.

4. galioto = Ĉe kroatoj kaj italoj (ne en PIV!) ĝi signifas homon kiu remas sur galero, ofte sklavon. Ĉi tie ankaŭ: malbonega homo.

5. „Ev-ev-iv-a I-ta-li-a" = „Vivu Italio!" (itale korekte: *Evviva Italia*!).

6. Amiraljo = admiralo. Vorto nekorekte uzita de neklera homo.

7. ĉozoto = pejorativa vorto en iuj ĉemaraj regionoj de Kroatio. Signifo: italo (aŭ italaĉo). La vorto devenas de la itala urbo Chioggia (kjoĝa).

8. Krasno = pilgrima loko en la kroata montaro Velebit. Sanktejo de Dipatrino.

Snježana Ivanović

POEMO SEN NOMO

Mi vivas vivon sen vivo
Kio estas reala, mi ankoraŭ ne scias
La jaroj preterpasis min
Mi ankoraŭ ne scias, kial mi estas ĉi tie

La fino estas proksima, mi povas diri al vi
Ni portis maskojn tiel longe
Ni manpremis kun gantoj
Tiel longe, tiel longe, tro longe

Nur nun ili estas videblaj
Ili estas parto de ni ĉiuj
Nun ĉio eblas
Ĉu ni maltrafis la lastan buson?
La lastan buson al realeco
La lastan buson al lumo
La lastan buson al vero
La lastan buson al amo

Turnante kapojn unu de la alia
Ni ne scias kion diri
Restante enfermitaj en niaj kaĝoj
Nur revante eliron
El koŝmaro

Bonorde enpakitaj en la beleco de la Tero
Kun ĝia verdo kaj bluo kaj blanko
Kun ĝia oro kaj ĝia arĝenta tegaĵo
Sed tamen nur iluzion ni nomas vivo

Ĉu ni vere maltrafis la lastan buson?
La lastan buson al realeco
La lastan buson al lumo
La lastan buson al vero
La lastan buson al amo

Mi rifuzas kredi, ke tio estas ĉio
Mi rifuzas riverenci al mallumo
Mi rifuzas kapitulaci al senespero
Mi rifuzas fali

Kaj tial
Mi saltos en novan buson
Ĝi haltas ĝuste ĉi tie malantaŭ miaj fermitaj okuloj
En la purpuraj profundoj de maro
La maro de trankvilo, la maro de paco,
Interplektita kun la oro de la Suno
La Suno de la eterneco

Nun mi vidas la kialon, kial mi estas ĉi tie
Nun mi vidas, kio ni estas
Nun mi scias, kion ni faru
Por atingi la Belecon de la Vero

Ni fermu la okulojn al la mondo
Lasu Lin stiri la radon de la Vivo
Kaj ni trovos la Realecon
Kaj ni vidos la Lumon
Ni perceptos la Veron
Kaj fine sentos la Amon

René Matoušek
(1958 – 1991)

SONETO POR BIBA

Jam longe mi cerbumas,
Pri kio mi kantu al vi kara:
ĉu pri ia mondo mirakla,
Aŭ eble pri iu vivo reala.


Juneco kaj feliĉo belas verdire
Kaj amo estas magia ĉiam
Por belaĵoj la vivo ne sufiĉas
Kaj la fiaĵoj malaperu jam.

Shakespeare, Jesenjin, Baudelaire kaj Goethe
Poetoj vere senmortaj
Poemis siatempe sonete.

Morgaŭ forigos ĉian ŝajnaĵon,
La vivo montros sian veran vizaĝon.

Elkroatigis: Nikola Rašić

René Matoušek (JER, Szombathely, Hungario, 1981).
Fotis Ivan Špoljarec - Štef



RUDOLF RUBČIĆ - pioniro de Esperanto en Dalmatio

La baldaŭa 100-a datrevno de la organizita Esperanto-movado en **Split** instigis min esplori la vivon de **Rudolf Rubčić**, iomete forgesita kaj nesufiĉe konata kroata Esperanto-pioniro. Laŭ la kolektitaj informoj, sendube temas pri unu el la plej gravaj esperantistoj en Kroatio en la komenco de la 20-a jarcento.

Rudolf Rubčić naskiĝis la 18-an de novembro 1884 en **Zadar**. Liaj gepatroj estis ĝendarma kapitano **Marko Rubčić** (**Jezerane**, la 8-an de marto 1855 − **Split**, la 24-an de julio 1892) kaj **Edviga Justina Simonić** (**Imotski**, la 20-an de oktobro 1865 − 1920). Lia patro mortis en aĝo de 37 jaroj, kiam lia solfilo **Rudolf** estis 8-jara kaj frekventis la duan klason de popollernejo en **Split.** Unu monaton post la forpaso de sia edzo, la patrino **Edviga** kune kun la filo translokiĝis al **Dubrovnik**, kie **Rudolf** finis popollernejon kaj en la lernojaro 1901/1902 gimnazion. Lia patrino dum ok jaroj vivis kiel vidvino, sed en 1900 en **Dubrovnik** ŝi edziniĝis al 26 jarojn pli aĝa nobelo kaj politikisto **Antun degl'Ivellio** (**Imotski**, la 15-an de septembro 1839 − **Zadar**, la 24-an de februaro 1927), kies unua edzino **Filomena Trigari** (**Zadar**, 1845 − **Dubrovnik** 1898) forpasis du jarojn pli frue.

Post la finita gimnazio, en la studjaro 1903/1904 **Rudolf** ekstudis juron en **Zagrebo**. Lia studado okazadis laŭsemestre alterne en **Zagrebo** kaj **Graz**, kaj laŭ la propra aserto li diplomiĝis en **Graz** printempe de 1911.

Esperanton li eklernis en **Graz** en 1907. Pri la komenco de sia Esperanta agado, **Rubčić** publikigis tri faktoriĉajn artikolojn en la gazeto „La Marto" en **Graz** en la jaro 1911. En la unua artikolo li skribis pri siaj komencaj paŝoj en Esperanto, en la dua pri sia agado en **Dubrovnik** kaj en la tria li adiaŭis siajn stiriajn geamikojn, forlasante la urbon kaj revenante al **Dubrovnik**.

En la unua duono de 1908 li restadis ĉe siaj familianoj (la patrino kaj ŝia dua edzo) en **Dubrovnik**, kie kun **Niko Mirošević Sorgo** (**Korčula**, la 13-an de aŭgusto 1884 − **Londono**, la 13-an de septembro 1966) li komencis viglan reklamadon de Esperanto en gazetoj, kaj en majo samjare fondis Esperantan klubon. La Klubo ne daŭris longe, sed ĝi estis tre grava evento dum tiu pionira epoko. Lia kolego **Niko Mirošević Sorgo**, kiu Esperanton lernis en **Prago**, baldaŭ forlasis la movadon kaj dediĉis sin al profesia laboro, kiu estis kronita per politika kariero en la malnovjugoslava registaro, en kiu li estis ambasadoro kaj ministro.

La jaron 1909 **Rudolf** pasigis en **Stirio** kaj la unuan duonon de 1910 en **Triesto** kun la tieaj esperantistoj. Post diplomiĝo, en la jaro 1911 li revenis al **Dubrovnik**, kie samjare li eklaboris kiel notaria kandidato. En la Jarlibro de UEA por la jaro 1912 li estas menciita kiel delegito de UEA. Poste dum kelkaj jaroj, verŝajne pro la soldatservo, li ĉesis aktivi, sed en 1916 li denove aperis en la Jarlibro de UEA kiel ĝia delegito en **Dubrovnik**, dum vicdelegito estis **Olga Aranz**a (**Split**, la 11-an de aprilo 1896 − **Split**, la 1-an de julio 1976), fakte lia posta edzino. **Olga** estis filino de **Josip Aranza** (**Kaštel Novi**, la 12-an de februaro 1864 − **Zagrebo**, la 2-an de aprilo 1948), konata gimnazia profesoro en **Zadar** kaj poste kroata filologo, dialektologo kaj literaturhistoriisto en **Zagrebo**, kaj **Vinka Šegvić** (?, 1870 − **Zagrebo**, la 10-an de februaro 1954).



Olga kaj **Rudolf** geedziĝis en **Dubrovnik** la 1-an de aprilo 1918, kaj samjare **Rudolf** ricevis postenon en la Poŝta direkcio de **Zadar**, kien la geedzoj translokiĝis. En tiu posteno **Rudolf** tamen laboris tre mallonge, ĉar temis pri la lasta jaro de la unua mondmilito, kaj en oktobro tiujare disfalis **Aŭstro-Hungara Monarkio**. Pro la Kontrakto de Rapall kaj la itala anekto de **Zadar**, ĉiuj kroataj institucioj en **Zadar** ĉesis funkcii, kaj inter ili ankaŭ la Poŝta direkcio, en kiu **Rudolf** laboris. La edzino **Olga**, kiu tiutempe jam estis graveda, revenis al **Dubrovnik**, kie naskiĝis ilia solfilo **Edo Rubčić** (**Dubrovnik**, la 28-an de junio 1919 − **Split**, la 13-an de februaro 2001), kaj **Rudolf** evidente jam en 1919 ricevis postenon en la Poŝta direkcio de **Split**.

Dum siaj studentaj jaroj, **Rubčić** aktivis en la Stiria Esperantista Societo kaj Akademia Esperantista Societo en **Graz**. La starto de lia agado koincidis kun la propaganda kampanjo pri Esperanto en **Kroatio**, kiun per gazetaro kaj publikaj paroladoj en 1907-1908 komencis la aŭstrohungara oficiro **Mavro Špicer** (**Našice**, la 1-an de aprilo 1862 − **Zagrebo**, la 4-an de aŭgusto 1936). Rezulte de tiu kampanjo en decembro 1908 fondiĝis Unuiĝo de Kroataj Esperantistoj (UKE) en **Zagrebo** kaj en 1909 ekaperis la unua Esperanta periodaĵo „Kroata Esperantisto". **Rubčić**, kies artikolojn en tiu gazeto ni trovas jam ekde 1909, tuj fariĝis ĝia leganto kaj kunlaboranto. El liaj artikoloj ni ekscias pri la agado de Stiria Esperantista Societo kaj Akademia Esperantista Scieto en **Graz**, interalie ke **Rubčić** estis unu el la du prezidantoj de AES. En sia loĝejo en Gartengasse 19/III en **Graz**, li malfermis Esperantan Informejon por kroataj esperantistoj vizitantaj la urbon, kaj ni ekscias ke lin vizitis almenaŭ du gravaj kroataj esperantistoj el la pionira periodo: inĝeniero **Stanislav Tomić (Lič**, la 15-an de novembro 1879 − **Kolombio**, la 30-an de novembro 1931) el **Waldbach**, kiu estis pioniro de Esperanto en **Kolombio** kaj apotekisto **Đuro Vojković** (**Berek** apud **Bjelovar**, la 4-an de aprilo 1880 − ***Doboj***, la 11-an de aprilo 1966) el **Klanje**c.

Unuiĝo de Kroataj Esperantistoj pasiviĝis jam fine de 1911, la jaro kiam **Rubčić** diplomiĝis. Ni ne scias kio okazadis kun **Rubčić** dum la unua mondmilito, kiu baldaŭ eksplodis, sed supozeble li soldatservis aŭ eĉ partoprenis en la bataloj.

Post la militaj teruraĵoj, en la jaro 1921 en **Zagrebo** komenciĝis la sudslava agado de **Dušan Maruzzi** (**Skradin**, 1883 − **Ljubljana**, 1956). Pro la fakto ke **Maruzzi** kaj **Rubčić** konis unu la alian, ĉar ili ambaŭ studis en la Jura fakultato de **Zagrebo**, **Rubčić** tuj ekaktivis en la rondo de sudslavaj esperantistoj. Kiel konate, en 1921 komencis aperadi „La Provo" (poste „Konkordo"), redaktita de la ĵus veninta rusa elmigrinto **Nikolao Hohlov**, kaj kvankam modestajn, ni trovas la spurojn de la agado de **Rubčić** ankaŭ sur la paĝoj de tiuj gazetoj. Pro la interagado de **Maruzzi**, kiu aktivadis en la kontinenta parto de Kroatio kaj de **Rubčić**, kiu disvastigis Esperanton en ĝia marborda parto, la movado sufiĉe bele progresis. Tuj post sia alveno al **Split**, **Rubčić** komencis reklamadi Esperanton kaj ĉirkaŭ si kolektadi samideanojn. Rezulte de tio, la 7-an de aprilo 1922 en la vira popollernejo en la **Splita** kvartalo **Lučac**, estis fondita Esperanta klubo, kiu poste dum pluraj jaroj ludis ŝlosilan rolon por disvastigi Esperanton en **Dalmatio** kaj en la dalmatiaj insuloj. La unua kongreso de sudslavaj esperantistoj okazis en 1923 en **Zagrebo**, kaj **Rubčić** partoprenis ĝin kune kun sia edzino **Olga**. Verŝajne jam tiam klaris, ke la duan sudslavan kongreson povos organizi nur la progresema Esperanta klubo de **Split**. La kongreso okazis en **Split** en 1924 kun vere brila sukceso kaj partopreno de multaj eksterlandaj esperantistoj, interalie de la Esperanta eldonisto **Teo Jung**, kunlaboranto de **Maruzzi**, kiu tre sukcese reklamadis la agadon de **Splitaj** esperantistoj per sia gazeto „Esperanto Triumfonta" (posta „Heroldo de Esperanto").

Dank' al multaj artikoloj pri Esperanto en diversaj dalmatiaj gazetoj, sed plejparte en „Novo doba" kaj „Jadranski dnevnik", ni ekscias pri vere ampleksa agado de esperantistoj en **Split** kaj **Dalmatio**, pri la gravega rolo de **Rubčić**, sed ankaŭ pri multaj malamikoj de Esperanto, arestoj kaj konfiskoj. La arkivo de la Esperanta klubo Split delonge malaperis, forbrulis ankaŭ parto de la dokumentoj de la urbaj instancoj kaj de la Ŝtata arkivo en **Split**, do ni ne scias kiam la agado de la Esperanta klubo definitive ĉesis, sed tio povis okazi en la jaro 1938 aŭ plej laste en aprilo 1941, kiam fondiĝis la ustaŝa Sendependa Ŝtato **Kroatio**.

Kio okazadis kun **Rubčić** dum la Dua mondmilito, ni ne scias. Laŭ la artikoloj aperintaj en „Slobodna Dalmacija" en 1951 ni ekscias, ke tiujare li klopodis renovigi la esperantistan agadon, sed bedaŭrinde li forpasis jam la 13-an de majo 1951. Lia tombo troviĝis en la splita tombejo Lovrinac, sed ŝajne nun ankaŭ ĝi ne ekzistas.

Ĉi tiu artikolo estas nur resumo de la dujara esplorado farita en la Ŝtataj arkivoj de **Zadar**, **Split**, **Dubrovnik** kaj **Zagreb**, en la Ŝtata arkivo en **Graz** kaj Universitata arkivo en **Graz**, Nacia kaj universitata biblioteko en **Zagrebo**, traserĉado de naciaj kaj Esperantaj gazetoj el la periodo 1900-1951 kaj ampleksa korespondado kun multaj personoj. La tuta materialo estas deponita en la Dokumenta Esperanto-Centro en **Đurđevac**, en la dosiero D-0693. Kompreneble, pro la limigita spaco, multaj detaloj ne estas publikigitaj en ĉi tiu artikolo.

Josip Pleadin

METEORITA FESTO

DUM 25 JAROJ KEL ORGANIZAS METEORITAN FESTON EN HRAŠĆINA

Antaŭ 25 jaroj Kroata Esperanto-Ligo metis en sian programon organizadon de Renkontiĝo de meteorito en **Hrašćina**. Dum jaroj **Hrašćin**a fariĝis ofta celo de renkontiĝoj de kroataj esperantistoj kun sciencistoj kaj verkistoj, kunvenintaj en la bieno de **Spomenka Štimec.**

Ĉi-jare Esperanto-Societo *Trixini* el **Hrašćina** planas organizi la jubilean feston, kiu okazos kadre de la programoj lige al la 270a jubileo de la alveno de la meteorite al **Hrašćina**. Espereble la kronviruso permesos okazigon de la evento, la 29an de majo 2021.

En **Hrašćina** okazos diversaj programoj. Interalie oni prezentos la libron pri la meteorito de **Hrašćina**, verkita de d-ro **Tatjana Kren.** La libro enhavas ankaŭ esperantlingvan resumon, ĉar estas esperantistoj kiuj per tiu aranĝo revekis atenton pri la, jam iom forgesita, meteorito de **Hrašćina**

La meteorito falis la 26an de majo 1751 en la vilaĝon **Domovec** de la komunumo **Hrašćina.** Alteriĝinte ĝi falis en du pecojn. La unuan fojon ĉe la falo de iu meteorito oni aplikis enketadon inter la vidintoj. La enketadon gvidis la zagreba episkopo **Klobušick**i. La pli granda peco falis sur la kampo de **Mijo Koturnas** kaj ĝi estis sendita al **Vieno**, al la imperiestrino **Maria Teresia** kaj precipe al ŝia edzo la imperiestro **Francisco Unua Stefano**, kiu havis apartan intereson por eksterteraj objektoj kaj kiu petis ricevi la objekton, venintan el la ĉielo. La meteorito de **Hrašćina** estis analizita, ĝi konsistis el la fero Fe 89% kaj nikelo 10,5%. Aparte valorajn esplorojn faris sciencisto **Alois Widmanstätten**, kiu malkovris ene de la meteorito certajn figurojn. Kiu objekto enhavas tiajn figurojn, nomataj **Widmanstätten**, venas el la ĉielo. La figuroj fariĝis pro kunpuŝiĝo de la materio dum grandaj malvarmoj de la kosmo tra kiuj la materio vojaĝis – sur la tero tiaj malvermegoj ne ekzistas.

Dum la programo oni prezentos la libron pri la meteorito el **Hrašćina**. Esperanto-Societo Trixini prezentos la 29an de majo siajn pliajn du projektojn: la literaturan vojaĝlibron tra **Hrvatsko zagorje** de **Božidar Brezinščak Bagola** kaj la kroatlingvan libron *Hodler en Mostar* de **Spomenka Štimec.**

Spomenka Štimec



AŬSTRA VERKISTO CLEMENS SETZ PRI LITERATURO EN ESPERANTO

Juna aŭstra verkisto **Clemens J. Setz** (naskita 1982) publikigis en la jaro 2020 libron pri planlingvoj en la germana lingvo kaj eldonis ĝin ĉe la prestiĝa eldonejo Suhrkamp en **Berlino**. La libron li titolis laŭ certa verso de **Rainer Maria Rilke** *Die Bienen und das Unsichtbare/ Abeloj kaj la nevideeblo.* Li lernis dum la esplorado kelkajn planlingvojn por povi enprofundiĝi en la temon, interalie Volapukon kaj Esperanton. Al la esperanta literatura li dediĉis cent el 400 paĝoj de la libro. Unu favoran ĉapitron de la verko li dediĉis al la esperantlingvaj verkoj de **Spomenka Štimec.** En ĝi li analizas la verkojn *Kroata milita noklibro* kaj *Hodler en Mostar*. Kroataj gazetoj *Zagorski list* (la 13an de marto 2021) kaj *Varaždinske vijesti* (la 13an de aprilo 2021*)* kaj VTV (TV en Varaždin, la 16an de marto 2021) publikigis intervjuon kun **Spomenka Štimec** okaze de la libro de **Clemens Setz.**

S. Š.



ASOCIO “GOLULOJ DE ISTRIO” UZAS ESPERANTON

Asocio de sportistoj-goluloj en la regiono **Istrio** volas atentigi, ke gravan aspekton de sporto prezentas virinoj kiuj defendas pilkon ĉe la golejo – la golulinoj. La asocio okupiĝas pri trejnado de golulinoj. Ĝi decidis uzi la neŭtralan lingvon Esperanton por sia nomo per kiu la membroj atentigas ke viraj kaj inaj goluloj estas egale valoraj. La asocio nomiĝas *Egale valoraj!*

S.Š.

MATEMATIKA LIBRO DE DAVOR KLOBUČAR – LA TRIAN FOJON

Davor Klobučar, vicprezidanto de Kroata Esperanto-Ligo kaj la prezidanto de Esperanto-Societo *Liberiga Stelo* en **Osijek**, la dumjara prizorganto de la retejo www.esperanto.hr, kiu neatendite forpasis en julio 2020, havis krom Esperanto alian grandan pasion - matematikon. Li publikigis en la kroata lingvo dikan libron *Matematiko nia* ĉiutaga*,* kiu havis du eldonojn. Antaŭ la morto li estis preparanta la trian eldonon kun sume pli ol 1500 paĝoj, konsistantaj el la ampleksa prezento de diversaj aspektoj de matematiko, sed ankaŭ fiziko, kemio, astronomio kaj de ĉiuj kampoj, kie la matematiko estas aplikata.

La libro estas la kombino el la altnivela kaj populara matematiko. Tian kombinitan stilon mi nenaim vidis: apud la seriozaj teorioj oni trovos amuzajn komentojn, anekdotojn kaj ŝercojn. Li klopodis laŭ la plej simpla maniero aliri leganton kaj laŭ la plej akceptebla maniero klarigi ĉion kion li iam aŭdis pri iu ajn aspekto de matematiko. Tial la titolo de la libro, kaj same ĝia amplekso.

Davor, senfine enamiĝinta al la matematiko, ekde la elementa lernejo notadis en sian notkajeron diversajn matematikajn informojn kaj interesajn matematikajn enigmojn. Li ne konjektis, ke iam li uzos tiujn notojn por krei tiel ampleksan verkon.

Du tagojn antaŭ la morto li sendis al la presejo la trian eldonon, en amplekso de 1500 paĝoj, kiujn li imagis kiel 3-voluman eldonon.


Dario Hrupec en la postparolo de la libro verkis, ke la baza celo de tiu libro ne estas instrui, sed stimuli scivolon kaj amon al matematiko, konvinki multajn homojn ke la matematiko ne estas timigilo, kiel multaj homoj perceptas ĝin, sed vere io bela kaj interesa kaj aldone utila. Li volis kuraĝigi la homojn ke la matematiko ne estas nur por aparte dotitaj homoj sed por ĉiuj el ni.

Mi kredas ke ĉiu el ni trovos ion utilan en *Matematiko nia* ĉiutaga*.*

Antoaneta Klobučar



D-ro sci. JOZO MAREVIĆ
(1940 - 2021)



La 11-an de aprilo 2021 en Zagrebo forpasis **Jozo Marević**, unu el la plej gravaj kroataj latinistoj, leksikografoj kaj esperantistoj.

Li naskiĝis la 25-an de aprilo 1940 en la vilaĝo **Bagalovići** (komunumo Metković) en la kamparana familio. Elementan lernejon li finis en la proksima urbo **Opuzen**, kaj klasikan gimnazion en la katolika seminario en **Dubrovnik** (Collegium Rhagusinum) en la jaro 1966. La germanan kaj latinan lingvojn kaj literaturojn li studis en la Filozofia fakultato en **Zadar.**

Li laboris kiel instruisto en la Elementa lernejo en **Kula Norinska** en sia nakiĝregiono, kaj poste kiel mezlerneja profesoro en **Novska** (1965-1971). En la jaro 1971 li ekpostenis en la eldonejo „Školska knjiga” en **Zagrebo**, unue kiel merkatikisto, kaj dum pluraj postaj jaroj li laboris kiel ĉefa redaktoro de la Socia-humanisma redakcio. Li magistriĝis en 1979, kaj doktoriĝis en 1988 en **Zagrebo** pri la temo de pedagogia merkatado. Inter 1990 kaj 1994 li organizadis kaj gvidis prezentiĝojn de kroataj eldonistoj en la plej granda eŭropa librofoiro en **Frankfurto.**

Li okupiĝis ankaŭ pri historiaj temoj, kaj organizis tri internaciajn sciencajn simpoziojn pri la ekzekutejo de kroataj soldatoj en Bleiburg, pri kiuj li redaktis simpoziajn librojn.

Li membris en pluraj sciencaj asocioj.

Sian plej grandan sukceson li tamen dankas al leksikografio. Li aŭtoris ses vortarojn, el kiuj eĉ kvar enciklopediajn.


En la jaro 1988 li ricevis Premion Mate Ujević (de la Leksikografia instituto en Zagrebo) kaj Ŝtatan sciencpremion (en la fako de humanismaj sciencoj) por leksikografia verko „Kroata-latina enciklopedia vortaro” (1977). En 2001 li ricevis premion de la Departemento Dubrovnik-Neretva por sia „Latina-kroata enciklopedia vortaro”.

Li esperantistiĝis en la jaro 1966, dum sia restado en **Novska**, kie li fondis Esperanto-societon „Novesp”, reklamadis Esperanto kaj gvidis plurajn Esperanto-kursojn. Sian kurson de Esperanto li publikigis ankaŭ en la tre populara lernejana gazeto „Modra lasta”.

Dum certa tempo li estis membro de Esperanto-societo „Mondo paca” en **Velika Gorica,** kie li vivis. Li kunfondis Unuiĝon de Zagrebaj Esperantistoj (la 12-an de decembro 2007) kaj estis ĝia membro ĝis la forpaso.

Li tre estimis nian plej faman esperantiston, prof. **Ivo Lapenna**, kiun li omaĝis je nekutima maniero. En sian vivoverkon, „Oklingva medicina enciklopedia vortaro”, kiu aperis en 2016, apud la latina, angla, franca, germana, hispana, itala kaj kroata, li enkondukis ankaŭ Esperanton, signante ĝin per la mallongigo ILo (= Internacia Lingvo, sed ankaŭ Ivo Lapenna). Tiu vortaro enhavas eĉ 3184 paĝojn!, kaj estas la plej ampleksa libro vendata en la Esperanta merkato!

J. Pleadin



BOJANA ĐURIČIĆ
(1935 - 2021)



En la zagreba Covid-malsanulejo mortis la 4n de januaro 2021 nia fidela membro **Bojana Đuričić**, esperantistino de la jaro 1957. Ŝi naskiĝis la 10an de aprilo 1935 en **Crkveni Bok.** Knabinaĝe ŝi estis kun siaj familianoj kaptito de la koncentrejo **Jasenovac**. Dum ŝiaj lernejaj jaroj ŝi finis konstruteknikan lernejon kaj laboris kiel teknika desegnisto.

Ŝi dum multaj jaroj estis estrarano kaj bibliotekisto de Esperanto-Societo *Bude Borjan.* Multajn Universalajn kaj naciajn Esperanto – Kongresojn ŝi partoprenis kaj estis grava helpanto dum la zagreba UK. Esperanto estis grava parto de ŝia identeco.

La lastajn jarojn ŝi pasigis en zagreba maljunula hejmo. Ŝi estis la persono pri kies helpo la kroata Esperanto-Movado ĉiam povis kalkuli.

S. Štimec



FLEGISTINO MARIA

ĉiu vekiĝo forportas
unu post la alian el la malsanuleja ĉambro
kun rideto de flegistino maria

ĉe multaj instrumentoj
ŝi nutras la bonan duonon de la konsolo
aerumas la ĉambron kaj ombrigas ĝin

ke ni malpli konsciu pri ni mem
frakasitaj de la vivo mutaj ludiloj de la morto
ĝis ŝia rideto…

…denove vekas nin aŭ eble ne
nur la nomo sur la lito estas ŝanĝita
kaj ŝi plue laboras matendeĵore

Božidar Brezinščak Bagola

Foto: Ivan Špoljarec - Štef